# *Renovigeblaj energifontoj en Kubo: bioelektrejo estos parto de la energetika matrico.*



La entrepreno Biopower S.A. formita de kapitalo kuba kaj brita, anoncis la ekkonstruon de la unua bioelektrejo en Kubo, kiel parto de la strategio de la insulo por ampleksigi la uzon de renovigeblaj energifontoj ene de sia energetika matrico.

Unu el la akciistoj de la konstru-entrepreno, Francisco Lleó, emfazis ke tiu unua fabriko, kiu estas konstruata en la ?irka?a?oj de la sukerfabriko Ciro Redondo, estos parto de  tutlanda projekto, celanta konstrui aliajn 25 fabrikojn en la venontaj jaroj.

La estrarano precizigis ke balda? ekkomencos la konstruadon de dua biofabriko en la sukerfabriko Jesús Rabí, en la okcidenta provinco Matanzas, kaj memorigis ke Kubo posedas programon kiu celas atingi ?is 24% de elektra generado renovigebla ?is la jaro 2030, el kiu 14% apartenos al la sukera industrio.

La instala?o kies investo superas je 160 milionoj da dolaroj, generos 60 megavatojn hore surbaze de la taga konsumo de 2100 tunoj da sukerkana restajo kaj 1200 tunojn da specio de mimulo, arbustoj el dura ligno abunda en la insulo, kiu rezultigos ?paron de 50 milionoj da dolaroj pro tio ke ?i anstata?os krudoleon en la energian produktadon.

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/economia/128607-renovigeblaj-energifontoj-en-kubo-bioelektrejo-estos-parto-de-la-energetika-matrico

**Radio Habana Cuba**